Bonvolu ankaŭ uzi el „AE“ la novaĵojn el nia lando por represo en via ŝatata gazeto, ĉar oni neniam legas ion en via ŝatata gazeto pri Aŭstrio, kvankam ni multege laboris, certe pli multe ol kelkaj landoj, pri kiuj oni ĉiam povas legi ion, se ankaŭ tre ofte nur tute flankajn kaj ne gravajn aferojn. Ni per diligenta kaj vere malfacila laboro atingis grandegajn sukcesojn, sukcesojn, kiujn nur malmultaj landoj ĝis nun povas montri. „AE“ pri tiuj ĉi skribis, sed vi neniam havis la memkompreneblan afablecon, sciigi tiujn per via ŝatata gazeto al la tutmonda samideanaro. Ni tion ne povas kompreni. Ĉu ni ne ĉiuj laboras kaj devas labori por komuna celo? Kial vi tiam ignoras niajn laboron kaj sukcesojn? Oni devus kredi, ke vi ne ĝojas pri niaj sukcesoj! Kial? Bonvolu skribi, kio estas la kaŭzo. Ankaŭ pri nia oficiala organo „Aŭstria Esperantisto“ vi silentas. – En la jarlibro estas kelkaj malkorektaĵoj kaj mankoj. Ni petas, ke vi en la septembra numero de via ŝatata gazeto raportu pri:

1. Sur pĝ. 116 mankas:
   1924 XVI-a E.-Kongreso en Wien;
2. sur sama pĝ.: 1924 inaŭguro de marmortabulo je memoro de nia Majstro sur la muro de hotelo Hamerand, kie loĝis nia Majstro dufoje;
3. pĝ. 132: la estraro ŝanĝiĝis.“

Ni esperas, ke UEA plenumos niajn dezirojn.

Sekvis nun koncizaj raportoj de la AED-landestroj.

La dua parto de tiu ĉi kunsido havis tre zorge laboritajn referatojn pri aktualaj temoj, kiujn oni traktis, por havi interkonsentitan bazon por estonta sukcesa laboro. La titoloj estas:

1. La laborista E.-movado (Smital-Wien).
2. Propagandaj laboroj de AED per „AE“ (Steiner).
3. Propagandaj laboroj de AED per la gazetara servo. Pro malhelpo ĉeesti la kongreson la gvidanto de la „Gazetara Servo“, d-ro Pfeffer, komisiis s-ron Steiner, ke li anstataŭu lin raportante pri la multspecaj faritaj laboroj de la gazetara servo.
4. Instruaferoj kaj ŝtata ekzamenkomisiono (Schamanek — Tullnerbach).
5. Esperanto-Literaturo Aŭstria (D-ro Leo Blaas-Rattenberg).
   Du rezolucioj unuanime akceptataj.
6. Oficialigo de Esperanto en Aŭstrio (Smital). Raportas pri proponoj de d-ro Halbedl, Graz, sistemigo de oficialigcela laboro por E. kaj pri la fondo de „Aŭstria Esperanto-Instituto“ en Wien. (Koncerna rezolucio unuanime akceptata.)
7. E.-stenografio sur bazo de unuecsistemo. (Mathiascheck, Hallein.)
8. Tutmonda Polica Ligo, grupo Wien. (Gaidosch, Wien.)
9. Propono de eksdirektoro Bock, ke oni instigu la instruministerion al reskripto al mezlernejestroj pri E. (Unuanime akceptata.)

Fine la kongreso akceptis grandan solenan rezolucion al la publiko laŭ propono de s-ro Schade.

La tekstojn de la referatoj ni publikigos sinsekve en la venontaj numeroj de „AE“, la rezoluciojn kune kun la referatoj.

La Salzburgan publikon atentigis pri E. ĝenerale kaj specialaĵoj propagandvespero en „Wienersaal“ de la moderne konstruita ejo de „Mozarteum“ (muzikakademio), kie parolis prof. d-ro Christanell pri E. ĝenerale, prokuristo Schade — Wien, pri „E. kaj komercistaro“, s-ro dir. Schamanek pri „Oficiala E.-instruo kaj ŝtata ekzamenkomisiono“ kaj s-ro Smital pri „E., la latino de l' demokratio“; ĉiuj en germana lingvo.

Certe interesos ĝenerale la deziresprimo de la kongreso, ke la Sesa Tutaŭstria okazu pentekoston venontjare en Graz laŭ invito de la diligentaj Graz-anoj.

La tagoj en Salzburg pruvis al ĉiuj partoprenintoj nerefuteble, ke la laboremo, celkonscieco kaj laborenergio en Aŭstrio estas belesperige grandaj.

Kuraĝe antaŭen!

Steiner, ĝen. sekr. de la V-a.

Decido pro la „Kompromit“-afero.

La Direktantaro de Aŭstria Esperanto-Delegitaro akceptis en sia kunsido en Salzburg, la 8 aŭg., je la 6 h vespere, jenan decidon (koncerne la artikolojn aperintajn en „Heroldo“ n-ro 57 kaj 60), kies tekston ĝi sendis por publikigo al diversaj E.-o gazetoj, al C. K. kaj K. R.:

„Ĉar ĉiuj aŭditaj atakoj kontraŭ nia merite konata prezidanto Franz Josef Schade pro ilia nekompleteco ne povas ekskui nian fidon al li, ni konsideras ilian pritrakton nia propra afero.

Pro tio ni devas taksi la skandalecajn esprimojn de la artikoloj („Kiuj kompromitas nian movadon“, „Vera skandalo“, „Ne tute puraj okazintaĵoj“) riproĉoj kontraŭ ni. Bedaŭrinde nek la skribinto de la artikoloj nek la redaktoro de „Heroldo“ havis ŝajne la kuraĝon, publikigi la nomon de la aŭtoro. Tion ni postulas!

Tia efektivigmaniero de agado, kiu ŝajne celas savon de la reputacio de Esperanto en tutmondo, estas por ni ne komprenebla. En la tuta mondo estas kutimo, ke oni provas ordigi ŝajne malkorektajn aferojn publikajn per esploro ĉe kompetentuloj antaŭ ilia publikigo. Kiu ne sekvas tiun elementan regulon, ne fuŝu en publika organizado!

Tia agadmaniero kompromitas fakte nian movadon! Ni energie protestas kontraŭ malhelpo de nia celkonscia, pena laboro por Esperanto (sendube imitinda de aliaj landoj) flanke de „grava“ tutmonda organo samcela.

Ni plue postulas pro la intereso de Esperanto en Aŭstrio, ke ĉiuj „kolektantoj“ de materialo kontraŭ Franz Josef Schade, prokuristo en Wien, aŭ kontraŭ L. K. K. XVI-a sentu la moralan devon — post la nuna decido nia — transdoni ĝin al nia ĝeneral-sekretariejo (adreso: Hugo Steiner, ĉefinspektoro fervoja, en Bisamberg 248 ĉe Wien).

Por eviti en ĉies intereso pluan konfuzon per la adresoj „Wien, VI., Mollardgasse 55“ aŭ „Wien 56“ ni insiste rekomendas al ĉiuj skribontoj, uzi de nun jenajn adresojn:

Por A. E. D.: Hugo Steiner, ĝen. sekretario, Bisamberg 248 ĉe Wien;

por L. K. K. XVI-a: Johann Schröder, redaktoro, Wien, VII., Kaiserstrasse 10;

por privataj leteroj: Franz Josef Schade, prokuristo, Wien, I., Kärntnerstrasse 21.“

Va S. A. T.-Kongreso.

De la 11a ĝis 15a aŭgusto 1925 okazis en Wien sub la protekto de „Wien-a Laborista Ĉambro“ la Va kongreso de la laboristaj E.-istoj. Pli ol 200 gesamideanoj el 11 landoj alvenis por partopreni organizajn laborojn akcelantajn la laboristan E.-movadon. 14 gravaj laboristaj organizacioj el nia kaj aliaj landoj sendis reprezentantojn, kiuj parte en germana lingvo parte en E. esprimis simpatiojn kaj promesis subtenon por E.

En 8 bone vizititaj laborkunsidoj solvis fervora kaj celkonscie laboranta kongresanaro gravajn organizajn, teknikajn kaj lingvajn problemojn kaj deklaris denove la valoron kaj neceson de E. por la laboristaro. Krom diversaj fakkunsidoj estis ankaŭ aranĝata festvespero en la laborista hejmo de la XXIa distrikto. La kongresantoj kaj gastoj estis solene bonvenataj de diversaj laboristaj korporacioj kaj akompanataj al la festejo. Preskaŭ 600 personoj entuziasme aplaŭdis la celtaŭgajn prezentaĵojn.

La rezolucioj — preskaŭ ĉiuj unuanime akceptataj — ne restos nur paperaj deklaroj sed estos direktivoj por la venonta agado en la laborista E.-movado.

Samideanoj interesiĝantaj pri la S. A. T.-movado riceuos informojn de la Wien-a peranto de la asocio, s-ano Franz Jonas, XXI., Jedlersdorferplatz 33/65.

R. Ĉech.

E.-sekcioj de „Naturamikoj.“

Laŭ decido en la Va SAT-kongr. (14. VIII.) la Wien-a grupo de nun centro. Grupestro: R. Cech, IX. d'Orsayg. 7.

Kuraĝe antaŭen!

Proksima estas nia celo
kaj inda je klopodo pena,
sed kiel forta citadelo
ĝi estas je malhelpoj plena.
Sed ni ne cedu, ni ne ĉesu,
kaj nian devon ne forgesu!
Kuraĝe antaŭen!

Jen ĉio ŝajnas kontraŭstari
kaj ĉie nian vojon bari.
Ĉu ĉesu ni en la laboro,
ĉu cedu ni dum grava horo?
Ne! Ni ne cedu, ni ne ĉesu,
kulturan devon ne forgesu!
Kune ni iru kontraŭen
kuraĝe antaŭen!

F. Christanell.

Libro pri kuirarto.

Mi intencas prepari libron pri kuirarto, kiu enhavu priskribojn de ĉiuj plej ĝeneralaj kaj ankaŭ naciaj manĝaĵoj. Mi petas ĉiujn, kiuj sin speciale pri tio interesas, helpi al mi ĉu per alsendo de materialo ĉu per konsiloj. Oni sin turnu al s-ino Edmond Privat, 2 Chemin de Roches, Genève (Svislando).

(El „Heroldo de Esperanto“.)

Tradukekzercoj.*)

Redakt. Walter Smital-Wien.

Nr. 1: Ein unbekannter Brief Richard Wagners.

(Meldung aus Prag, vom 9. September 1925.)

Nach einer Korrespondenzmeldung wurde ein bisher unbekannter Brief Richard Wagners, der in seinem interessanten Inhalt über das Verhältnis Wagners zum damaligen König von Bayern und seinem Außenminister Pfortner Aufschluß gibt, im August 1925 von Prof. Srba in Triest entdeckt. Der Brief ist vom 11. April 1866 aus Luzern datiert, wohin sich Wagner nach den Intrigen seiner Feinde beim bayrischen Hof begeben hatte. Am Schlusse des Briefes spricht Richard Wagner von der Wiedergeburt Deutschlands, mit dessen Wohl das Ideal seiner Kunst stehe oder falle. Der Brief wird im Original und in Übersetzung sowohl als auch im Faksimile in der nächsten Zeit, und zwar zuerst in Prag veröffentlicht werden.

*) Nova rubriko, instalita laŭ deziro de multaj lernemaj s-anoj, kiuj deziras perfektiĝi sian stilon. La taskoj traktos aktualajn temojn ĝenerale interesajn. Ni komencas per ne tro malfacilaj.

Aŭstria Esperanto-Delegitaro

Bisamberg bei Wien, Nr. 248.

Devoj de l' aŭstr. esperantistaro plej baldaŭ efektivigotaj!

1. Plakatoj en stacidomoj. Tiu ĉi grava komuna propagandlaboro urĝas! Agu tuj laŭ la precizaj instigoj en „A. E.“, n-ro 7-a.

2. Abono de „A. E.“. Laŭ deziresprimo de nia V-a en Salzburg ĉiuj grupoj decidu por siaj membroj devigan abonon de nia oficiala organo. Avantaĝoj: a) Kontakto nepre necesa por celatinga organizlaborado; b) per la tekstoj: Interparolinstigo por la grupvesperoj; c) monprofito de la grupoj (15%); d) mono por jarabono sendebla ¼-jare (anst. tutanjarsumon tuj).

3. Kursgvidantoj uzu „A. E.“ kiel legaĵon (bonaj tekstoj, subteno de l' organo). Avantaĝoj: a) Aktualaj interesaj tekstoj malmultekostaj por ĉiuj lernantoj komunaj; instigo al interparolado; b) 15% por la perinta gvidanto. (Po n-ro: 40 gr; do abono pli malmultekosta!) Anoncu la bezonatan nombron da n-roj ĝis 5a ĉiumonate al la administrejo!

4. Estrojn de kafejoj k. s., kie esp-istoj estadas, instigu al abono kaj publikdisponigo de „A. E.“; la novinstalitaj germanaj tekstoj senpage propagandos por via grupo en la publiko!

5. Firmoj komercaj en via loko estu instigataj al la nova anoncado malmultekosta per du linioj en „A. E.“. Prezoj: por 1 jaro 11 Ŝ, por ½-jaro 6 Ŝ. La grupoj instigintaj rajtas postuli de la mendanto 2 Ŝ, respektive 1 Ŝ pli por si mem.

6. La grupoj mem anoncu per tri linioj (rig. la ĉi-numerajn ekzempl-ojn en rubriko „Kie oni renkontas esp-istojn?“): Ejon, tagon, horon. Prezo: por 12 monatoj 11 Ŝ; por duonjaro 6 Ŝ.

Konscienca plenumo devas rezultigi post malmultaj monatoj grandiozan E.-movadon en Aŭstrio. Ne forgesu, ke E. ne estas ludaĵo, sed serioza kulturafero! Ĉiu oferu do persiste la malmultajn paŝojn al konatuloj kaj kelkajn bonajn vortojn. Ĉu mi tro multe postulas? Por kio ni havas oficialan organon? Por kio ŝvitas la presisto? Por kio redaktoro kaj kunlaborantoj dediĉas preskaŭ ĉiujn vivmomentojn al „A. E.“ anstataŭ al sia familio? — se **vi ne eluzas** tiun akumulitan forton!

Walter Smital-Wien.

Adolf Macho sepdekjara!

Unu inter niaj plej malnovaj E.-pioniroj jubileas. Konata estas en Aŭstrio, ke li helpis en longjara propaganda kaj instrulaboro pretigi la fundamenton por nia E.-movado, precipe en la grava instruista rondo. Oficiale rekonata estis lia penado per tio, ke la ministerio por instruaferoj eknomis lin membro de la ŝtata ekzamenkomisiono por Esperanto. Li ankoraŭ longe ĝoju pri la fruktoj de sia semado! Kun kora gratulo ni transigas al li nian specialan deziron, ke li ĝuu ankoraŭ multajn jarojn en plej bona sanstato.

Respekte por E.-Del. de Wien:
Walter Smital, prez.

Atentu ekzamenotoj!

Ni ricevis la jenajn sciigojn:

„Tre estimata s-ro redaktoro!

La libron ‚Methodik des neusprachlichen Unterrichtes‘ de O. Thiergen anstataŭos ‚Methodik des neuspr. Unterr., I. Bd. Grundlagen‘ de Philipp Aronstein (eld. Teubner-Leipzig).

Sindone d-ro F. Wollmann.“

Plue: La ekzamenkomisiono, instalita de la ministerio por instruaferoj, komencos la unuajn ekzamenojn la 3. novembro 1925 je la 8a per la skribaj ekzamenoj en la domo de Liglanda faklernejo por instruistinoj en Wien, I., Hegelgasse 14. Ili estos daŭrigataj la sekvontajn tagojn. La dato de la buŝa kaj praktika ekzamenoj estos sciigata ĝustatempe al la ekzamenaspirantoj.

La petskriboj pro partoprenpermeso por la ekzamenoj kun la aldonoj laŭ § 4 de la ekzamenregularo (vidu „A. E.“ n-ro 5, pĝ. 50) kaj stampo (1 Ŝ). estu prezentotaj ĝis plej malfrue 3. oktobro 1925 al la direkcio de la ekzamenkomisiono Wien, I., Burgring 9 (Stadtschulrat), ĉambro 53.

La ekzamenkostoj da 20 S. resp. 10 Ŝ. estas pagotaj antaŭ komenco de la skriba ekzameno.

Kurso prepara por la **ŝtata** ekzameno pri instrukapablo estas aranĝata de „E.-Organizo de la Oficbavantoj de urbo Wien“ en propra instruejo IV., Schäffergasse 3, ĉiun mardon kaj vendredon depost la 22. sept. 1925, 18—20 h. Daŭro ses semajnojn. Kotizo proks. 10 Ŝ. Sinanoncoj kaj informoj ĉe la supra adreso. (Gvidonto: W. Smital).

Esp.-o en la komerco. La organo de l' „Gremio de la Wien-a komercistaro“, kiu organizis ĉiujn firmojn de Wien (enskribitajn en la komerca registro) kaj posedas du komercajn akademiojn kaj plurajn komerclernejojn, „Der Handel“ (La komerco) publikigis artikolon de prof. Otto Simon „Esperanto en la komerca korespondo“. Ĝi nun aperigas kurson por komercistoj en 20 lecionoj, gvidatan de d-ro Pfeffer. „Der Handel“ havas 50.000 legantojn.

Kursoj okazintaj.

Atzgersdorf ĉe Wien: En la turista unuiĝo C. A. T. V.: 18 pers. (komenc. 19. VIII.)

Landeck in Tirol: Fakinstruisto Alb. Mair el Wien dum libertempo. 32 lernantoj. Vicurbestro Neubauer fondis grupon „Esp. Rondo“.

Wien: En la universitato (gvid. d-ro Pfeffer) 42 finintoj.
Ĉe la „E.-Organizo de la ofic-havantoj de urbo Wien“ (gvid. Ĉech) 19 fin., (gvid. dir o Feder) 16 fin.
Ĉe la „Libera Laborkomuno“ konversacia kurso (gvid. Ultmann) 25 fin.
En XV-a distrikto kun 16 ĉehaj metilernantoj (gvid. Fr. Franc).

Rimarkindaj presaĵoj.

Luyken H. A., Pro Iŝtar. Romano el la antikva Babilona historio. Originale verkita. Eld. Ferd. Hirt & Sohn, Leipzig, Esperantofako, 1924. 301 pĝ. 14:20 cm. Bindita 6 Rm.

Estas nerefutebla aksiomo, ke ĉiu homa lingvaĵo komencis esti lingvo en la pli alta signifo de la vorto nur tiam, kiam ĝi ekhavis sian propran literaturon; ĝis tiu tempo ĝi restis nur malperfekta esprimilo por la ĉiutagaj bezonoj. Por evolui al la nivelo de la ĉefaj kulturlingvoj, ankaŭ Esperanto nepre bezonas propran. t. e. originalan literaturon. Bonŝance ĝi jam havas tiun. Al la ne tre granda aro de ĝiaj meritoplenaj reprezentantoj apartenas unuavice nia angla amiko H. A. Luyken. Liaj kvar originalromanoj estas bonegaj kaj inter ili la plej nova, jen priparolata „Pro Iŝtar", sendube la plej bona kaj pro la elektita temo ankaŭ la plej interesa. Mi ne hezitas aserti, ke oni povas kompari ĝin kun la ĉefverkoj de la tutmonda romanliteraturo. Ĉerpitaj el la antikva historio kiel ekzemple tiuj de Feliks Dahn, Georg Ebers, Levis Wallace, Boleslaw Prus (La Faraono), Henryk Sienkiewicz (Quo vadis?) k. a. samkvalitaj. Bonega pure fundamenta Esperanto kaj modela, eleganta, sed tamen facile komprenebla stilo estigas ĝin ne nur ĝuoriĉa legaĵo por lertuloj, sed ankaŭ, kio eĉ pli gravas, eminenta ekzercilo por malpli perfektaj samideanoj.

Fr. Zwach-Wien.

„Amoro kaj Psihe" de Lucius Apulejus; trad. de d-ro Emil Pfeffer; Esp. Bibl. Internacia n-ro 12; 53 pĝ.; 2. eld. (4a—8a milo); prezo 60 g; eldon. Ellersiek und Borel, Berlin-Dresden. — La volumeto peras ravige simple la faman rakonton el „Metamorfozoj". Jam la nomo de l' tradukinto, unu inter la plej talentaj E.-stilistoj de Aŭstrio, garantias la valoron; la dua eldono pruvas ĝin. Kristalklara, preciza kaj tamen fleksiĝema vortoteksaĵo devigas la leganton, senti latinlingve, do havigas ankaŭ al nelatinlingvano la plenan ĝuon de l' originalo. W. Smital.

„Atta Troll", Somernokta sonĝo, de Heinrich Heine, trad. de Zanoni; Nov. Esp.-Bibliot. n-ro 10; eldon. Ellersiek und Borel, Berlin-Dresden, 1925; prez. 1.50 RM. — Kiu ŝatas spritan elegantan satiron, certe ŝatas Heine. Eble „Atta" estas lia plej elkora poemo certe ne formortonta el la mondliteraturo. En nuna tempo, iom parenca al la tiama (1841), ĝi reaktualiĝis. Konciza tre interesa priparolo de la verko el la plumo de kompetenta Heine-kritikisto Max J. Wolff troviĝas en „Germana Esperantisto" n-ro 8/9. — La traduko? Mi neniam legis pli vervan. La nomo Zanoni diras ĉion pri ĝi. W. Smital.

„Eterna Sopiro" de Immanuel Olŝvanger; eld. Societo Danubio, Wien, VII., Lerchenfelderstr. 23; 1925; prezo: 90 g.

Tridek unu paĝoj per korsango de nobla homo skribitaj. Fluantaj versoj; ekz: „Ne koleru, se mi diras. kion mia kor' sopiras; ĉar vin helpos sur la tero nek ekscito, nek kolero." Kiu povis aŭskulti en Danubiejo (17. VIII. 1925) la majstro-paroladon de l' aŭtoro pri „La sociaj problemoj en Sud-Afriko", tiun ne mirigos la poemperloj en la libreto kaj li ne forgesos tiun sinceran modeste-fieran varmkoran homon, naskiĝintan poeto.

W. Smital-Wien.

„El dramoj", fragmentoj el Ifigenio (Goethe) kaj Rabistoj (Schiller), trad. de d-ro L. Zamenhof; Esp. Bibl. Intern. n-ro 7, 2a eld. (4a—8a mil.); 1924; eld. Ellersiek & Borel, Berlin-Dresden; prezo: 0·40 RM.

Ne unu vorton pri fragm. el verkoj de nia majstro! Nur la gloson, ke la libreto estas oficiale rekomendita legaĵo por ekzamenkandidatoj. W. Smital-Wien.

Svislando. Du turistaj kartoj, eld. la unua de Svisa Fervojo Federala en Bern (trad. de Jules Perlet, poŝtkesto 560 Bern), la alia de Svisa Centra Turisma Oficejo en Zürich (d-ro Spielmann). Sur unu flanko estas belaj landkartoj koloraj, sur la alia po 12 ilustraĵoj kun E.-teksto. Interesiĝantoj mendu ĉe la koncernaj oficejoj. H. St.

„Oficiala jarlibro de la Esperanto-movado 1925." U. E. A., 12 Boulevard du Théâtre Genève; 468 pĝ; sur 168 pĝ. la adresoj de 1.676 delegitoj en 1.318 lokoj de 60 landoj; sur 116 pĝ. 325 komercaj anoncoj. Tre ĝojiga certe por multaj estos la pliriĉigo de la unua parto: Enciklopedio (93 pĝ.). Kvankam kelkaj paĝoj estas ne zorge preskorektitaj — pardoninda fakto ĉe tia amplekso —, la redaktoro meritas multan laŭdon pro tiu ĝeneralutila laboro. Sole la tre valora jarlibro estu motivo por aliĝo al U. E. A.! Bedaŭrinde mankas kelkaj gravaj datoj pri Aŭstrio, kelkaj indikoj pri nia lando estas falsaj. Kies kulpo? W. Smital.

Jarlibro 1925 de Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (T. A. G E.); eld. Novaj Tempoj, Leipzig-Co., Klemmstr. 14 pt., Germanio. Prezo: Bonvalutlandoj 1 sv. fr., mezvalut. 3 fr. fr., malbonv. 0.60 RM.

Surprizanta aperaĵo. La organizo-skemo sur pĝ. 3 montras, kiel sin grupigas ĉirkaŭ la centro (Internacia Estraro: Marcel Boubou, 96 rue St Marceau, Orleans, Fr.), naciaj asocioj kaj izoluloj, fakoj (pedag. terminaro, internac. historilibreto, porinfana literaturo, internac. lernejo-servo) kaj la publikigiloj (rubriko en N. T., jarlibro) Sekvas la regularo kaj poste la adresoj de la membroj Ili loĝas en 1095 lokoj de 48 landoj kaj sumas 2231. Inter ili estas 942 en 295 lokoj germanlandaj; 43 aŭstrianoj en 25 lokoj; 170 francoj en 129 lokoj; sed ankaŭ la landoj Alĝerio, Ĉinio, Egipto, Litovio, Maroko, Persio kaj Nov-Zelando ne mankas. La organizo estas impona, multon promesanta por la estonto. Pro tio ĝi meritas la atenton de ĉiu serioza instruisto. D-rino Liane Domonkos-Wien.


„Bildoj el la germana revolucio". Eldon. Uns-Produktiv-Genossenschaft, Leipzig. 14 bildoj kun klariga teksto sur la kontraŭaj flankoj, presitaj sur bonega papero. La nigre kadrumitaj paĝoj sin prezentas kiel inda memordokumento pri la malfacilaj tagoj de l' germana proletaro. W. Smital.

Gvidlibro tra Venecio, eld. de la „Zamenhofa E.-grupo"-Venecia, 142 pĝ., 20 bildoj kaj urboplano, prezo Liroj 10. kun alsendkostoj. Rekomendinda por vizitontoj, imitinda de aliaj E.-grupoj.

Raportis pri Esperanto.

„Der städt. Angestellte" en ĉiu numero.
„Gemeindewoche" — Korneuburg, en ĉiu n-ro.
„Mitteilungen d. wirtschaftlichen Organisation der Aerzte Wiens" n-ro 7, 15. VII. „Pordoktora disertacio per E. en la medicina fakultato Lyon" (d-ro Sós).
„Neues Wiener Tagblatt" 14. VIII. pri la Va (helpas nian movadon).
„Öst. Volkszeitung" 13. VIII. longa artikolo pri la Va. (favora al E.).
„Radio—Wien", I., Stubenring 1, en n-ro 42 pri E.-radioprogramo, n-ro 45: longa art. pri nia V-a en Salzburg.
„Pravda", ĉeĥa katolika gazeto, poresperanta ĉefartikolo (I. Hlavaĉ).

Krucvortenigmo.



Ĉe krucvortenigmo oni komencas ĉe la cifero kaj daŭrigas ĝis la nigra kvadrato aŭ la rando en vertikala kaj horizontala direkto.

Horizontale: 1. titolo, 2. rivero en Italio, 3 alta mondkompreno, 4. ŝtata buĝeto, 5. floro, 6. ĝojesprimo. 7. ekkrio de doloro, 8. limigata ebenaĵo, 9. arbo, 10. pronomo, 11. poema formo, 12. loĝanto de suda Anglio, 13. dispartigas la ŝtatojn. 14. prepozicio, 15. sankta besto en antikva Egiptio, 16. nombro, 17. afrika kreskaĵo el la familio de liliaceoj, 18. detruita kastelo, 19. simila al pluvo, 20. altvalora metalo, 21. maljeso, 22. ruĝeta mineralo uzata por kolorigo, 23. montarebenaĵo en Centra Azio, 24. figuro en kartludo, 25. erupciaĵo de vulkano, 26 kreskaĵo, 27. parto de granda konstruaĵo, 28 parto de surtuto, 29 persono el greka mitologio, 30. ĝardena frukto, 31. mallongigo por grava Esperanto-organizaĵo.

Vertikale: 1. speco de poemo, 32. grava parto de homa korpo, 33 eksotika arbo, 34. malgrandigo, 35. grava objekto en ĉambro, 36. prefikso, 37. metalo, 38. biblia nomo el la libro Rut 39. same kiel, 20 horiz., 40. estinte, 41. frukto, 42. pezilo, 8. sento de simpatio, 43 kiel, 36. vert., 9. mezuro por elektra forto, 10. same kiel, 0. horiz., 44. alkonduko de varoj, 45. instrumento, 14. same kiel, 8 vertik., 46. Kiu krios, 15 sufikso, 47. prepozicio, 48. laboro, 49. skribilo, 50. sufikso, 51. malpuraĵo, 52. rektangula, 18. prefikso, 53. parto de vorto, 21. esprimo de atendo, 54. malofta, 55. puriga ago, 56. stato, 57. kontraŭo, 24. termezuro, 26. aserto, 59. jam malofta speco de bovoj, 28. kiel 10. vertik., 58. kiel, 31. horiz.

Vortfinaĵoj o, a, i estas apostrofitaj; oblikve legata de malsupre supren la vico formas nomon de konata eminentulo en Esperantujo. Ull.

Wo trifft man Esperantisten und erhält Auskünfte?

Kie oni renkontas E.-istojn kaj ricevas informojn?

So = d, Mo = l, Di = m, Mi = me, Do = ĵ, Fr = v, Sa = s.

Graz.

Esp. Verein für Steiermark, Bürggasse 16, Gasthof (gastejo) „Altes Stadttheater", Di (m) 20—23 h.

Klosterneuburg.

Esp.-Servo, Martinstr. 59—61, gastejo Ebner (Leiter: Ebner u. Leidlmayr) täglich (ĉiutage).

Knittelfeld.

Esperanto-Grupo, Gasthof (gastejo) Schwerterbräu, Bahnstr. 31, Mi (me) 20 h.

Korneuburg.

E.-Verein, Mi (me), Knabenschule 20 h.

St. Pölten.

E.-societo „Nova sento", Café Linzerstr. 32; F (v), 20—22 h.

Wien.

Aŭstria Katolika Ligo Esperantista, I., Kleeblattgasse 7, Mi (me) 17—19 h.

I. Wiener Esp.-Verein, I., Weihburggasse 12, (Kasino) Fr (v) 19·30 h.

Esp. laboristaro kristana de Aŭstrio, Esp.-Verein der christl. Angestellten und Arbeiterschaft Oesterreichs, I., Bräunerstraße 7, I. rechts (dekstre), Do (ĵ) 18—21 h Privatlokal (privata ejo).

Aŭstria Pacifista Esp.-Societo, III., Rasumofskygasse 7 (Café Zartl), Di (m), 19—21 h.

Esp.-societo „Junularo", III., Radetzkystr. 25, (Café Molkereihof), Do (ĵaŭde), 19 h.

Esp.-Verein der städt. Angestellten Wiens, IV., Schäffergasse 3, Sa (s) 18·30—20·30 h (den ersten Monatssamstag: Besuch der Delegitaro — la unuan sab. de l' monato en delegitaro.)

„Konkordo", V., Margaretenplatz 4 (Terrassencafé), Do (ĵ) 19—22 h.

Esp.-Societo „Danubio", Café Egkher, VII., Lerchenfelderstraße 23, Mo (l) 19 h bis 23 h.

Akademischer Esperanto-Verein, I., Universität. Zusammenkunft wie (kunvenejo la sama kiel) „Danubio".

Freie Esperantistische Arbeitsgemeinschaft. Auskünfte (Informoj), wie „Danubio". Täglich (ĉiutage) 18—19·30 h.

Esp.-Bildungsverein „Supren". VII., Kaiserstraße 121, Café. Fr (v) 18—21 h.

Polizei-Esp.-Verein, VII., Karl Schweighofergasse 3, Do (ĵ) 18 h.

Esp.-Unio Fervojista XIV., Avedikstr. 2, Di (m) 19 h.

Esp. societo „Fideleco", Währinger Bürgercafe, XVIII., Staudg. 1, Di (m) 16—19 h.

Wäsche und Wirkwaren = tol- kaj maŝintrikaĵoj:

L. Breuer's Nachf., Rathausg. 2.

Karl Schenk, Wienerstr. 25.

Werkstätte f. Photogr. u. Reklame = laborejo por fotogr. kaj reklamiloj:

Theo Füchsel, Heßg. 6; tel. int. 71.

Wollwaren, Strickerei u. Niederlage = lanaĵoj, trikejo kaj vendejo:

Paula Kotoul, Marktg. 3.



Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Hugo Steiner, Korneuburg, Postfach 26. — Presejo: Gesellschafts-Buchdruckerei Brüder Hollinek, Wien III, Steingasse 25.